



# Sinjoro Kohàn

de Sima Rafii

el la persa tradukis Amir Fekri



# Sinjoro Kohàn

de Sima Rafii

el la persa tradukis Amir Fekri



**Dediço al profesoro  
Saheb-Zamani  
la patro de Irana  
Esperanto** 

## Enkonduko

La persa kultur-arta semajrevuo *Ketabestan* (Librujo) en sia kvara numero (januaro 2016) aperigis rakonton nomata “S-ro Kohàn”.

La rakonto estas pri s-ro Kohàn, kiu konatiĝinte kun Esperanto, kaj kompreneble instruisto de la lingvo, trovas novan signifon por daŭrigo de la vivo, sed ...

“S-ro Kohàn” ankaŭ estas parto de la historio de la eperanto-movado en Irano. Se nuntempe iranaj esperantistoj uzas kaj utiligas Esperanton, tio ŝuldiĝas al la honestaj kaj sindonaj penadoj de tiu, kiu lasis la dungon de universitata profesoro -kaj ankaŭ multajn aliajn aferojn- kaj komencis instrui elementajn kursojn de Esperanto, entute 145 kursojn, tute senpage.

S-ino Sima Rafii, kiu estas rakontisto kaj tradukisto, per siaj brilaj tradukoj, la triopaj libroj de Mandela [“longa vojo al libereco”, “gvidado laŭ maniero de Madiba” de Martin Kalungu-Banda kaj “vojo de Mandela” de Riĉard Stengel] fakte plibone konigis Mandela-on al la perslingvanoj. Ŝi diras: “Iutage tute hazarde mi vidis artikolon de profesoro Saheb-Zàmani en la revuo *Ketabestan*. Tiam ankaŭ mi decidis publikigi mian rakonton, kiu temas pri tiuj tagoj”.

La skribanto de ĉi-linioj intencas uzi potencialon de Eperanto, kiel la ponto inter lingvoj, kaj kundividi ĉi tiun dolĉan rakonton, precipe kun neperslingvaj esperantistoj.

Amir Fekri

2017.09.19



La vintro de la jaro 1987 estis malvarmega kaj severa; severa pro la milito okazanta ĉe la frontoj, pro la risko de aera bombado de la urboj, pro la manko de brulaĵo kaj medikamentoj, kaj pro la porciolimiĝo de manĝaĵoj. Sed el la koro de tia malvarmega kaj severa vintro, floris la bonodora glacifloro nomata E-lernejo. La E-lernejo kunvenigis entuziasmojn en paco, amikeco kaj humanismo.

Esperanto laŭvorte signifas tiun, kiu havas esperon. La scienclingvo aŭ planlingvo, kiu estas la nacia lingvo de neniu lando kaj ĝia instruado ne vundas kulturan fieron de neniu nacio. Tiu ĉi lingvo donas la eblon al ĉiuj esperantistoj, ke sub egalaj kondiĉoj ili povu uzi la sciencajn, la teknikajn kaj la literaturajn atingojn de la homaro.

La E-klasoj jam okazis en malnova konstruaĵo troviĝinta en la strato 16 Azâr. Bonvenigo de la intelektuloj, la universitataj profesoroj kaj ankaŭ la ordinaraj personoj de tiuj klasoj vere estis okulfropa. S-ino Kohàn estis inkluzive de tiuj, kiuj entuziasme venis por lerni Esperan-



ton. Iutage ŝi venis en mia oficejo por konsulti pri sia edzo. Ne-laste diabeto estis forpreninta lumon de liaj okuloj kaj pro ĉi tiu afero ankaŭ li la tutan tagon malliberigis sin hejme.

- "S-ro doktoro! Mia edzo post blindiĝo, konstante kaŭras angule kaj kun neniuj parolas, eĉ ne plu prizorgas siajn florzvojn, kiujn iam amis kiel siaj gefiloj kaj prizorgis ilin. Tamen dank' al Dio, li parkeras la sanktan Biblio-n. Foje mi vidas, ke li estas recitanta frazojn el ĝi malĝojoĉe kaj larmas". S-ino Kohàn diris ĉi tiujn kaj la larmoj plenigis ŝiajn okulojn.

"Ne lasu lin resti sola en la hejmo, precipe en ĉi tiuj tagoj, kiam ĉiumomente estas la risko de aera bombado. Lin ankaŭ eĉ venigu kun vi mem al la E-kurso". Mi diris.

- S-ro doktoro, mi ne imagas en tia aĝo li povu lerni novan lingvon, kvankam antaŭe li ĉiam sekvis lerni la diversajn lingvojn.

Mi diris plej certe: La lingvo Esperanto ne distingas inter junuloj kaj olduloj.

Ŝi vespiris:

- Sed ne temas pri nur lia aĝo. Kiel antaŭe mi diris, li blindas.

"S-ino Kohàn! Ne tiel severu. Esperanto ankaŭ ne distingas inter blinduloj kaj malblinduloj". Mi diris.

La sekvan tagon, matene, mi ekbruligis la nafto-fornon kaj kontenta je ĝiaj varmaj flamoj mi iris al la multaj ricevitaj leteroj, kiam rapidaj kaj sinsekvaj bastonklakadoj ekaŭdiĝis de la koridorofino. Mia koro asertis, ke tiuj ĉi estas la bastonklakadoj de s-ro Kohàn. Mi iris por bonvenigi lin. Jes, estis ĝuste li. Mi demandis, ĉu mi helpu lin per mia brako. Li dankis, sed li ne lasis min helpi. Li bastonklakante eniris la oficejon, mi eltiris seĝon por li. Li sidiĝis, ekspiris, kompaktigis sian blankan bastonon kaj diris:

- Vi estas la fondinto kaj la lernejestro de ĉi tiu lernejo! Vi estas universitata profesoro kaj ankaŭ doktoro de ĉi tiu lando, kaj vi tamen ve-



nis al la fino de la koridoro por bonvenigi blindan maljunulon kiel min?

“S-ro Kohàn, vere mi ĝojas vidi vin ĉi tie”. Mi diris.

Li ridetis kaj sur lia maldika kaj skeleta vizaĝo la ĝojo aperis. Li permane tuŝis siajn grizajn harojn maldensajn kaj malbutonis la mantelon. li neorde jam butonumis ilin. La ĉambro estis pli malvarma ol mi proponi lin demanteliĝi.

Mi malantaŭ la skribotablo iom movis mian seĝon kaj eksidis ĉe lia flanko. “S-ro Kohàn! mi aŭdis vian edzinon, ke laŭ-ŝajne vi multe interesiĝas pri lerno de la lingvoj kaj kvazaŭ vi tute regas la hebrean kaj la latinan lingvojn”. Mi diris.

La pupiloj de liaj okuloj rapidege ektorniĝis; du grizaj globetoj polvkovritaj, kvazaŭ klopodis savi sin el la malluma turnakvo.

“Estas prave. Ankaŭ mi iom scipovas la araban”. Li levis sian kolon kaj diris. “Hodiaŭ mi venis ĉe vi por plidemandi pri ĉi tiu nova lingvo. Kompreneble, mia edzino pri ĝi iom klarigis. Kio estis la nomo de ties kreinto? Ĝuste li havis bonan nomon.” Li aldonis.

Tute nevole mi etendis mian manon al la bildo, kiu estis sur la skribotablo, sed mi ekmemoris, ke li estas blinda. Pro tio mi diris: ĉi tiun lingvon kreis geniulo nomata Lazarus Zamenhof en la jaro 1887. “Esperanto estas lingvo, kiu kreĝis por faciligi komunikadon inter diversaj popoloj. Ĝi havas potencialon, ke igu vin mondĉivitano”. Mi aldonis.

“Kara doktoro, mi ne imagas povi ankoraŭ lerni novan lingvon”. Li diris kun streĉita vizaĝo kaj maltrankvile. Lia kolo ne plu estis rekta kaj lia gorĝa pomo regule iris supren kaj malsupren.

Mi metis mian manon sur la lian. Sentebelis tro malvarmo. Mi kuraĝigis lin: Ne dubu s-ro Kohàn!

El la varmbotelo, kiu estis sur la skribotablo mi verŝis teon en du tasojn kaj demandis lin: Vi ŝatas teon kun aŭ sen citrono?

Li profunde spiris. Kvazaŭ la odoron de la citrono tute entiris en





siajn pulmojn, kaj diris: Kun la citrono kara doktoro! La parfumo de la citrono estas la parfumo de la vivo. Mi hejme havis kelkajn arbetojn da la citrono kaj la oranĝo. Kiaj floris ili printempe. Hejme ĉiam ni havis freŝajn citronon kaj bigarado. Verdire, tiom mi amis tiujn florzonojn kaj arbetojn, ke eĉ neniu imagis iutage mi fariĝi tiel indifernta pri ili. Sed la diabeto tute estas malĝojiganta min. Mi ne plu prizorgas ilin. Mia edzino diras: Kohàn! Viaj floroj estas velkantaj. Mi ankaŭ tiel respondas: Nu akvumu kaj kompoŝtu ilin. Ŝi diras: La akvo kaj la kompoŝto ne plibonigas ilian farton. Ili volas vin.

Mi metis la tason da teo antaŭ li. Li malrapide etendis sian manon al la skribotablo kaj kiam ĝi trafis la subtason, tiam dankis min kaj demandis: ĉu la tetinkejo de la lernejo aktivigas? “Bedaŭrinde ne. En tia milita cirkonstanco kaj porciolimigo kiu kuraĝas aktivigi la tetinkejon?” Mi respondis.

Li prenis la tason kaj trinkante guton da teo diris: Mia edzino diris, ke ankaŭ la studentoj provizas la brulaĵon de fornoj.

- Jes ĝuste. Ĉiumatene, ĉiu el la studentoj kunportas botelon da la nafto al la lernejo.

Li ridante diris:

- Sed Kohàn ne povas fari same, antaŭ ĉio mi avertis vin.

Mi denove metis mian manon sur la lian. Nun iomete jam varmiĝis.

“Tio ne estas grava afero! La varmo de via ĉeesto sufiĉas por ni”. Mi diris.

Li suspiris:

- Kara doktoro! vi estas kristanima. Longe vivu!

Veninte s-ro Kohàn, la bonvenigo de la E-lernejo pliiĝis kaj la tetinkejo ankaŭ aktivigis. Li donacis la sian porcion de kupona sukerpeco kaj sukeron tute al la E-lernejo. Li regule partoprenis en la kursoj kaj persisteme kaj serioze lernadis. Li serioze partoprenis kursojn kaj kunportis malgrandan



Sinjoro Kohàn

magnetfonon al la klaso, kaj nomis ĝin la malliberigejo de voĉo!

Li diris:

- Kara doktoro! Nur Dio scias, kia plezuro estas, aŭdi vian kortuŝan voĉon el tiu ĉi ilo. Kompreneble antaŭe mi aŭdis vian voĉon el la radio-aparato, sed ĉi tiuj ne kompareblas kun unu la alia. Ili kiel la tago kaj la nokto estas malsamaj.

S-ino Kohàn diris:

- Evidentas, ke liaj notoj estas plibonaj ol la miaj. Tuttempe li gluas la magnetfonon sur sian oreilon. Mi diras: Kohàn, almenaŭ iom laŭtigu ĝin. Li pretekstis, ke ĝia baterio frue finiĝos.

S-ro Kohàn partoprenis en ĉiuj kursoj kaj kun brilaj notoj diplomigis. Kiam li instigigis, li diris: laŭ iu persa proverbo: "Afbla instruist(in)o sincera povas altiri lernant(in)on al la lernejo eĉ en feria tago."

Lia edzino diris:

- S-ro doktoro, mi ne scias kiel danki vin. Dum mia komuna vivo kun Kohàn, neniam mi vidis lin tiel gaja kaj vigla. En ĉi tiuj tagoj li daŭre pasigas la tempon kun siaj floroj kaj plantoj. Ankaŭ laste mi vidas, ke li estas fajfanta; najtingala fajfo! Li eĉ tute forgesis sian blindecon. Dank' al Dio!

Mi diris:

- Ĉi tiu estas pro benoj de la lingvo Esperanto, s-ino Kohàn.

Ŝi respondis:

- Li mem diras ĉi tiu estas pro benoj de via estado.

Dum pasis la tempo, mia rilato kaj s-ro Kohàn pliiĝis, kaj superis instruist-lernantan rilaton. Iam kiam ajn estis okazo, ni diskutis pri diversaj aferoj. Li estis tradukintaj frazojn el la sankta biblio en Esperanton kaj iufoje ilin legis por mi. Iutage mi demandis lin:

- S-ro Kohàn, vere kiom vi estas kredanto al la relegio de Moseo?



Li iom hezitis kaj diris:

- Kara doktoro! Iam iu islamano demandis al mi la saman. Lasu, ke mi ankaŭ donu tiun respondon al vi. Mi estas tiom juda, kiom vi estas islamano.

Ĉi tiun diris kaj ridegis. Poste li enpoŝigis sian manon kaj diris:

- Momenton! Mi tute estis forgesanta.

Li elpoŝigis du freŝajn citronojn, ĉe kiuj ankoraŭ restis folio, llin metis sur la skribotablon kaj diris: Jen citronoj, ne dankinde kara doktoro. Miaj arbetoj de citrono kaj oranĝo denove fruktodonis.

Gaje mi prenis ilin, flaris kaj diris:

- Dankon s-ro Kohàn! Kia ĝojiga novaĵo!

Li metis la manojn sur la bruston, duonklinis antaŭen kaj diris:

- Mi devas danki vin. Vi donis al mi revivon. Doktoro! Ĉiumatene vekiĝinte mi diras kun mi mem, la mondo belas, ĉar doktoro Saheb-Zàmani spiras en ĝi.

Ekplorante mi diris: Mi estas flatita s-ro Kohàn. Vi estas karulo de la lernejo.

Li ridis:

- Kara doktoro, mi estas ĝoja.

Mi diris:

- Mi ankaŭ ĝojas.

Kaj poste legis lirikon el la lirikaro de Salomono<sup>1</sup>:

---

1. Salomono estis la tria kaj lasta reĝo de uniita Izraelo. Apartigas ankoraŭ la fakulojn, ĉu Salomono estas vere historia persono kaj ĉu tio, kion priskribas la bibliaj tekstoj vere okazis. Ankaŭ kelkaj teologoj konsideras tion kritike, ĝuste kiel historiistoj aŭ arkeologoj.

Laŭ la biblio Salomono regis verŝajne de 961 a. K. ĝis 931 a. K.. Li estis filo de la reĝo David kaj de Batseba, edzino de Urija. Li sukcesis konservi kaj modernigi



Sinjoro Kohàn

- *Ho mia kolombo, kiu estas kaŝinta en la fendeto de rokoj aŭ malantaŭe ŝtonoj, lasu, ke mi vidu vin kaj aŭskultu vian voĉon, ĉar via voĉo mirindas kaj via vizaĝo belas.*

Li vespirinte aldonis: Mi dezirus, ke miaj okuloj havus iomete da lumo, tiam mi povus vidi vian belan vizaĝon kara doktoro!

Mi diris:

- Eble vi vidis foton de Bertrand Russell<sup>2</sup>.

Li kapjesis:

- Jes, jes mi jam vidis.

Mi diris: En la maljunaĝo mi similiĝos al li.

Li diris:

- Vian vizaĝon mi ne scias, sed vi mem estas plibona ol li.

- Vi estas tro afabla al mi.

Tiam la pupiloj de liaj okuloj ekĉesis turniĝi, kvazaŭ fiksrigardis min. Li suspiris:

- Neniam mi aŭdis, ke Bertrand Russell vivigu mortinton, sed vi vivigis min!

Kaj relegis por mi lirikon el la lirikaro de Salomono:

---

la reĝlandon kreitan de lia patro. Por tio li dividis la landon en dek du administraciajn distriktojn. La biblio priskribas lian regadon kiel tempon de legenda paco kaj prospero. (Vikipedio)

2. Bertrand Arthur William RUSSELL [BERtrand rasl] (naskiĝis la 18-an de majo 1872 en Ravenscroft, Monmouthshire, mortis la 2-an de februaro 1970 en Penrhyndeudraeth, Kimrio) estis epistemologiisto, matematikisto, logikisto, filozofo kaj moralisto tre grava en la 20-a jarcento. Li ankaŭ estis polemikisto kaj maldekstrula aktivulo, foje proksima al la ideoj anarĥismaj. Li aranĝis la Tribunalon Sartre-Russell opone al la krimoj de la vjetnama milito.

Russell ricevis la Nobel-premion pri literaturo en la jaro 1950 pro sia verkaro, kaj precipe pro sia humanista aktivado. (Vikipedio)

*- Li invitis min al sia festeno-salono kaj svingis sian afablan flagon super mi.*

Tuŝante siajn mallumajn okulojn li diris:

- Kara doktoro! KREDU, ke la deziro vidi vin faras min vivanta.

Mi metis mian manon sur la lian kaj diris: S-ro Kohàn, kiam vi ĝojas, mia koro ankaŭ lumiĝas.

\*\*\*\*

La vintro de la jaro 1988 estis multe pli severa. La milito ĉe frontoj, la misilado de urboj, la ruĝaj alarmoj de radio ktp. Saddam HUSSEIN<sup>3</sup>, kiu intencis konkeri Teheranon nur dum sep tagoj, nun, en sepa jaro de la milito, per long-distancaj misiloj, kiuj estis faritaj en Sovetunio, celis Teheranon kaj aliajn grandurbojn. Estas interese, ke unu el tiuj misiloj trafis ĝuste en la korto de la ambasadejo de Sovetunio!

Tehrano trovis milito-ŝiritan vizaĝon kaj la homoj grupope forlasadis la urbon al plisekuraj lokoj.

La E-lernejo ankaŭ fariĝis duon-feria; ĉar la plej multe da studentoj aŭ forlasis Teheranon kaj iris al plisekuraj lokoj aŭ preferis ne eliri el siaj hejmoj. Sed aŭskultu pri la elstara studento de la lernejo, s-ro Kohàn, ke la milito ankaŭ etendiĝis en lian hejmon; la milito de iri kaj ne iri. Ilia peto pri enmigro al Usono estis akceptita. S-ino Kohàn intencis iri, sed s-ro Kohàn ne konsentiĝis. S-ino Kohàn diris:

- S-ro doktoro, mi petas helpi min. Kohàn ne intencas veni kun mi. Li diras: Mi ne lasas la doktoron, kien mi iru? Vi mem iru, mi ankaŭ translokiĝos al unu el la ĉambroj de la E-lernejo. Mi ne povas kontentigi lin. Iunokto kiam mi multe parolas kun li, mi sentas, ke li estas fleksiĝinta, sed sekvan matenon, kiam li vekiĝas, li denove revenas al la sia unua decido kaj diras: La paradizo estas tie kien estas doktoro

---

3. Saddam HUSSEIN (aŭ Husayn) al-Majid al-Tikriti [sadám huséjn] (naskiĝis la 28-an de aprilo 1937 en la vilaĝo Aŭĝa, en la distrikto Tikrit, mortis la 30-an de decembro 2006) estis la prezidento de Irako de 1979 ĝis 2003.



Sinjoro Kohàn

Saheb-Zàmani. Mi ne venos.

Foresto de s-ro Kohàn estis malfacila ankaŭ por mi. Fakte, la amikeco kaj forta sento emocia inter ni, klare estis ekzemplo de ligo inter disĉiploj kaj majstro; ligo, kiu radikis en orienta kulturo. La senekzempla amo kaj afablo ligas entuziasmajn animojn al unu la alia; ligo, kiu estis nepriskribebbla.

S-ino Kohàn diris:

- S-ro doktoro! Neniu povas kontentigi lin krom vi.

Kaj mi demandis min mem, ke kial ĉiam oni transdonas tiajn malfacilajn aferojn al mi? Ĉiam dolorigis mian koron la disiĝo de karuloj, kaj kvazaŭ ne finiĝas.

S-ro Kohàn en vintra malvarma tago, kiam en Tehrano forte neĝis, forlasis Iranon kaj post lia foriro kvazaŭ la suno ankaŭ mortis en mia vivo.

Kiam mi petis lin, ke li kune kun sia edzino forlasu Iranon, unue li plendis: “Ĉu vi forpelas min de vi, doktoro?” Sed li aŭskultinte miajn kialojn kaj argumentojn, fine konvinkiĝis. Adiaŭante li elbrakumis min kaj amare ploris.

Li iris kaj restis por mi nur liaj memoraĵoj; la parfumoj de la citrono kaj la oranĝo, la liriko de Salomono, rapida bastonklakado sinsekva, dolĉaj sukerpecoj, kaj frazo, kiun li ĉi-laste en Esperanto esprimis: “La deziro vidi vin faras min vivanta!”

La vintron de la jaro 1989 mi ne memoras, ĉar mia memoro ankoraŭ ne estis reveninta. Kelkaj tagoj post foriro de s-ro Kohàn, misilo trafis lokon proksime de la E-lernejo, kaj la surdiga sono de la eksplodondo kaŭzis min tute perdi memoron.

Mi bone memoras la momentojn de antaŭ la eksplodo. Malantaŭ la skribotablo mi estis ŝanĝanta la lampon de stud-lampon, kiam eklaŭtiĝis la ruĝa alarmo el radio. La parolanto, kiu en tiaj okazoj ĉiam estis viro, zorge avertis la aeratakon kaj petis, ke la popolo iru al



plisekuraj lokoj kaj gardi sian trankvilon.

Kien mi povis rifuĝi? Sub sojlan arkon? Sub la tablon? Mi preferis resti malantaŭ mia skribotablo kaj elteni pacience momentojn, kiuj longis jarcenton plenan de angoro.

La ruĝa alarmo nervozigis onin. Tiam via koro ekbatis pli rapide kaj vi de angoro ekŝvitis; malvarma ŝvito.

La ruĝaj situacioj estis la momentoj de timo kaj espero. De timo, ĉar ĉiumomente povus fali misilo sur ĉiun homon kaj ties karulojn. De espero, ĉar la danĝera situacio baldaŭ forpasos. Tial, aŭdante la ruĝan alarmon miaj pensoj vagis tra malproksiamaj pasintoj, tra la bazaro de Basra, en kiu mistikula ŝtofvendisto tridek jarojn konstante flustris al si mem: "Mi pardonpetas Allah-on". Lutage oni demandis lin: Tridek jarojn vi daŭre flustris al vi mem ĉi tiun mencion, nu kial? Li respondis jene: "Iun tagon oni novaĵ-informis, ke la bazaro de Basra brulkonsumiĝis. Mi demandis: Ĉu ankaŭ mia butikoj? Oni diris: Ne, la via ne estas bruligita. "Laŭdo al Allah!". Mi diris. Fakte tiu mencio estis el mia memvolo kaj nek pro Dio. Tial, ekde tiam mi pardonpetadas Allah-on!".

Kaj vere en tiaj krizaj situacioj la homo alfrontis kun si mem, kun sia senmaska kaj reala memo, por ke komprenu - kaj ankaŭ hontu sin- kiom malproksimas de ĉi tiu verso de la irana poeto fama, Sàdi:

*La homoj estas membroj de ununura korpo*

*Ili estas kreitaj el ununura esenco*

*Aliaj membroj restos maltrankvilaj*

*Se suferiĝas unu membro*

Sed en tiu speciala tago kaj en tiuj streĉaj momentoj, antaŭ la eksplodo, mi ne memoris la mistikulan ŝtofvendiston, sed s-ron Kohàn; lian amaran ploron, lian gorĝan pomon, kiu samkiel koro batis, kaj liajn malfortajn brakojn, kiuj ĉirkaŭbrakumis min. La memoron de s-ino Kohàn, kun dika korpo kaj malleviĝaj ŝultroj kiu surmetis malhelblu-



Sinjoro Kohàn

an mantelon kaj staris angule, kaj kiel pentinta kulpulo singultis. La memoro de mi mem, mia dupartigita koro kaj la frazoj, kiujn mi diru por konsoli lin, sed tiuj vere ne konsolis lin, ĉar eĉ mi mem ankaŭ ne kredis ilin. Ho ve, se eblus diri lin: “Adiaŭ por ĉiam s-ro Kohàn!” Se eblus mi elploru sur lian skelet-ŝultron dum horoj. Tamen antaŭ lia foriro, mi retenis min mem kaj... .

Kaj nun, en ĉi tiu momento de timo kaj espero, mi gajis, ke ili jam forlasis Iranon. Mi deziras por ili bonfarton kaj sukceson. Sed subite la surdiga sono de la eksplodo deŝiris miajn pensojn, la vitroj rompiĝis, mi ĵetiĝis de sur la seĝo kaj nenion plu komprenis.

La eksplodondo sekuis la E-lerenejon kaj ĉiujn vitrojn dispecigis, eĉ la tasojn kaj subtasojn. La eksplodondo ankaŭ fendetis vitron kovrantan la foton de doktoro Zamenhof. La fendeto oblikve pasis tra la brusto ĝis sub lia mentono. sed la kapo kaj la vizaĝo ne damaĝis. Kvazaŭ la eksplodondo la bruston de Zamenhof ankaŭ vundis. Posttempe mi preferis konservi la foton tiele.

Horojn post la trafo de la misilo proksime de la E-lernejo, oni trovis min senkonscita kaj kaŭrita sur la planko de la E-lernejo. Mia korpo tute ne lezis, sed mi estis perdinta mian memoron.

La unuaj kuracoj ne estis efikaj kaj laŭ rekomendo de la kuracisto, mia familio translokigis min al unu el nordaj urboj. Ĉar la nordaj urboj havas belajn veterojn kaj okulkaresajn pejzaĝojn kiel la maro kaj la arbaro.

En la sumero de la jaro 1989 Irano akceptis la rezolucion 598 de Unuiĝintaj Nacioj kaj la milito finiĝis. Sed la detruaj efikoj kaj vundoj de la milito en multaj lokoj kaj ankaŭ en la korpoj kaj la animoj de la viktimoj ankoraŭ restis. Laŭ Garus Abdolmalekian- Irana juna poeto-pri tiaj detruaj afikoj:

*Diru min*

*Kiel mi povas rideti?*



*Kiam ankoraŭ ĉirkaŭ miaj lipoj estas plena de minoj...*

Kion mi povas rakonti tiujn senmemorajn tagojn krom citaĵojn de miaj familianoj kaj ankaŭ mia kuracisto, kiu regule vizitis min. Li mem diras:

- Kara doktoro! Via silento kaj kvieto impresas mian koron. Dum horoj vi estis sidinta ĉe la maro kaj alrigardis la ondojn senvorte. Mi esperis kaj preĝis al Dio, ke iutage sono de la muĝantaj ondoj retromemorigi vin, sed kvazaŭ mia espero vanis.

Mia nevo memorante tiujn tagojn, ĉiam esplorante diras:

- Onĉjo! Post la milito oni flustris versaĵon de Hosejn Azàr, kio kvazaŭ montris vian fatron:

*Nur mi estas, kiu scias,*

*Kial ofte vi silentas*

*Vi similas la unuan matenon de la postmilito*

*Kvieta kaj bela*

*Sed malĝoja*

*Vi similas la unuan matenmanĝon en la unua tago de la paco*

*Dolĉa kaj agrabla*

*Sed nur plorante,*

*Eblas tuŝi vin...*

La vintron de la jaro 1990 mi ne nur bone memoras, sed ankaŭ estas la plej kara min.

En la komenco de aŭtuno de la jaro 1990, nokton, kiu la fulmotondro kaj la pluvo forprenis de mia nevo dormon, mia memoro mirakle revenis. Mia nevo, kiu en tiu nokto prizorgis min, rakontas jene:

- Pluvegis. Mi malfermis la fenestrojn kaj subentiris la kurtenojn, sed la fulmoj ankoraŭ lumigis la ĉambron kiel tagon. Mi turniĝadis kaj



returniĝadis, kaj atendis sonsignalon de la horloĝo por veki vin kaj doni vian medikamenton ĝusttempe, kiam subite vi ekkriis en la dormo, s-ro Kohàn, s-ro Kohàn! kaj poste vi timiigite ekvekiĝis. Mi haste venis ĉe via lito kaj gaje demandis vin: Onĉjo, ĉu vi sonĝis? “Jes, mi sonĝis”. Vi respondis. “Mi sonĝis, ke s-ro Kohàn estas sur strato kaj ne havas bastonon en sia mano, kaj mi maltrankvila pri lia trafo kun aŭtoj kriis: S-ro Kohàn! s-ro Kohàn!”.

La sonĝo de s-ro Kohàn tute resanigis la memoron. Mi kiu dum-tempe estis komplete senscia pri la novaĵoj, nun aŭdinte ilin, similis la sep dormantoj<sup>4</sup>-n ĝuste elirantaj la kavon. La milito estis finita, la fondinto de la revolucio estis forpasita, la E-lernejo estis ferita ktp.

Glacifloro, kiu el la koro de vintro 1987 supren kreskis, kvankam velkis, sed ankoraŭ ne sekiĝis kaj mi intencis serioze revivigi ĝin.

E-lernejo en la komenco de la vintro 1990 reaktiviĝis sed la manko de s-ro Kohàn pli evidentiĝis. Inter multe da ricevitaj leteroj, de

---

4. Estas rakontate, dum la persekutado kontraŭ kristanoj de la imperiestro Decio (ĉirkaŭ 250) sep kristanaj junuloj de Efeso estis enkondukitaj antaŭ la juĝistoj pro ilia kristana kredo. Ili, rifuzinte oferi al la paganaj idoloj, estis kondamnitaj al mortopuno sed pormomente allasitaj al la libera vivo. Por eviti denove la areston ili sin kaŝis en groto sur la monto Celion, el kiu unu el ili, Malko, almozpetante vestite, iradis/venadis por provizi nutraĵojn. Ĉar malkovritaj, ili estis vivaj masonitaj en la sama groto. La sep junuloj endormiĝis en tiu karcerato atendante la morton. Ili estis vekitaj nur post 200 jarojn de ero de masonistoj kiuj, disfrakasinte la eksteran masonan parieton, celis konstrui ŝafejon. Estis pasintaj du centoj da jaroj: Malko, reveninte al Efeso, malkovris, kun miro kaj ĝojo, ke kristanismo ne nur estis tolerita sed ke eĉ ĝi jam fariĝis oficiala religio de la imperio. La junulo, erarprenita por frenezulo, estis juĝata verdiranta kiam la urba episkopo kaj civitanoj supreniris al la groto kaj konstatis la veron.

Tiam la sep junuloj fariĝis veraj atestantoj pri la resurekto de la homaj korpoj; ili tamen, mortis la saman tagon de sia releviĝo kaj estis sekve entombigitaj, laŭordone de la imperiestro Teodosio la 2-a, en tombo kovrita per orumitaj ŝtonoj (laŭ la Ora Legendo ili aperis al la imperiestro sonĝanta petante plurestadi al kaverno ĝis la fina resurekto). (Vikipedio)



s-ro Kohàn nenion mi ricevis. Ĉu li paŭtis min? Ĉu li fartis bone? Li promesis ne lasi min sencia pri sia farto, do kial li ne plenumis sian promeson? Kial s-ino Kohàn ne sendis leteron?

Tiujn kialojn kaj zorgojn, ĉe mia skribotablo, al kiu mi povis diri, krom al la foto de d-ro Zamenhofo, kiu kun fendita brusto sed esperantaj okuloj kuraĝigis min, esperu!

Jam ĉiu sonoro de la telefono, ĉiu sono de paŝo, imagante poŝtiston kaj novaĵon de s-ro Kohàn ŝokis min. Iu mankis al mi kaj mi serĉis tiun je sonoroj de la telefono kaj letero. Kaj mi ne sciis, ke grandnovaĵo survojas, jes grandnovaĵo!

\* \* \*

Neĝado, kiu ekde antaŭ meznokto falis, ĵus kovris la tutan urbon. Mi suden piediris de la placo Vâlîâsr al bulvardo Keŝavàrz, fermis mian pluvombrelon kaj lasis la neĝeroj falu sur mian kapon kaj vizaĝon.

Estis la vintro, sed mirinde la vetero estis printempa kaj odoris freŝe,odoro de ĝermi kaj flori. Post longa tempo mi sentis min bone. Kvazaŭ mi paŝis sur la nuboj. Mi staris angule, prenis plenmanon da neĝo, kiu estis sidinta sur la rompita branĉo de akacio kaj manĝis. Kia bongusta! Kia agrabla malvarmeto! Tio vivigis miajn infanecajn memoraĵojn, nur mankis suko de vinbero.

La paseroj ĉi tie kaj tie saltetadis kaj pepis. Mi staris sub arbo kaj rigardis ilin. Momente senvole mia mano eniĝis en poŝon de mia mantelo esperante trovi paneron, semon por paseroj. Kie estis mia semo?! Tio, kio venis en mian manon estis stumpileto de koncerto, kiun s-ro Kohàn invitis min; koncerto de la ĥorgrupo de la blindullernejo. Dum longa tempo mi ne surmetis ĉi tiun mantelon. La bileto odoris s-ron Kohàn,odoro de Briantin<sup>5</sup>, kiun ĉi-laste li uzis.

Mi atingis vojkruciĝon de bulvardo Keŝavàrz kaj 16 Azàr. La strato estis malmulta aŭtotrafiko kaj senhoma. Mi transiris zebrostrian pasejon, sed

---

5. harbriliga kosmetikaĵo



Sinjoro Kohàn

enironte la straton 16 Azàr momente senvole turnis mian kapon kaj vidis trans la straton; kiun neniam mi faris. Mi rapide palpumis. Ne eblis! Ne, ne estis sonĝo. Tiu ĉi estis s-ro Kohàn, kiu senbastone estis trapasanta zebrostrian pasejon. Mi ekkuris al li: S-ro Kohàn! Dum longa tempo mi estis serĉanta vin sur la ĉielo, sed jam trovis vin apud mi mem sur la tero!

Li tuj rekonis min per mia voĉo:

- Kara doktoro, ĉu ĉi tiu estas via voĉo?

Ni brakumis unu la alian.

Plorante mi diris:

- S-ro Kohàn! Ĉu mi estas sonĝanta?

Li tuŝis mian vizaĝon:

- Lasu mi bone vin rigardi. Mi jam diris, ke la deziro vidi vin, faras min vivanta. Nun ankaŭ mi estis iranta al la E-lernejo por vidi vin.

Mi malfermis mian pluvombreton kaj kun li ekiris al la E-lernejo.

Nun li estis sidinta ĉe alia flanko de skribotablo, sur sia kutima seĝo. Kaj mi rigardis liajn brilajn pupilojn, kiuj tra liaj okulvitroj similis globetojn. Ili ne plu rapide turniĝis kaj kviete fiksitis sur mi.

Mi senpacience atendis, ke li menciu nomojn de tiuj profesoroj, kiuj probable post kelkaj operacioj revenigis lian vidadon. Mi estis admiranta ilin ĉe mi mem, kiam s-ro Kohàn ekmenciis tri manĝaĵojn Esperante: la terpomo, la spinaco kaj la kokina ovo, kaj poste ridis.

- Kara doktoro! Verŝajne ili kune revenigis mian vidadon. Sed fakte la deziro vidi vin faris miraklon, kaj aliaj estas preteksto.

Mi mirante rigardis lin kaj vere ne povis kredi, ke terpomo, spinaco kaj kokina ovo povu fari tian miraklon. Pro tio mi diris: ĉu vi ŝercas s-ro Kohàn?!

Li suspiris kaj diris:

- Enmigrinte Usonon, komence, mi estis tre kolera kaj daŭre dam-

nis Kristoforo Kolumbo-n, kiu malkovris ĉi-kontinenton. Inverse, mia edzino estis feliĉega kaj tre kontenta. Ŝi diris: “Ni, ja ne venis al malbona lando. Dio kaj la homo man-en-mane kreis Usonon; moderna, bela, riĉa kaj la paradizo sur la tero”.

Kara doktoro, Dio min gardu, mi tiel kriis al ŝi, kiel neniam mi faris dum nia komuna vivo. Mi diris: Vin kaj vian Usonon la diablo prenu! Maljustulino! Kial en la finaj jaroj de mia vivo, vi migrigis min? Kial vi disigis min de mia amata instruisto?

Dum pasis la tempo, la kolero cedis sian lokon al la malĝojo; Profunda malĝojo. Mia koro estis samkiel oranĝo, kiu kontinue estis premata per forta mano. Mia edzino diris: Kohàn! Pro Dio malpli ploru! Vi dolorigas mian koron.

Mi tute ne parolis kun ŝi, nek kun aliul(in)o kaj mia nura intima amiko estis liriko el la lirikoj de Moŭlana<sup>6</sup> kaj plie tiu ĉi verso:

*La deziro vidi vin dolorigas korojn de miloj da personoj kiel Jakobon<sup>7</sup>*

*Ho Jozefo<sup>8</sup>, kial vi ade verŝajne ankoraŭ estas en la puto*

Tagnokte mi lamentis Dion: Ho Dio! Mi ankaŭ estas samkiel Jakobo, bonvolu redoni mian vidadon por vidi vizaĝon de mia doktoro Saheb-Zàmani. Li per malantaŭa flanko de la manplato viŝis siajn larmojn el la okuloj kaj aldonis:

Dum tiuj tagoj, familia amiko, kiu ankaŭ estis kuracisto proponis tiun dieton. Mia edzino malespere diris lin: Mi ne kredas tion. Li pro malespero riskas sian vivon en la danĝeron. Lia dieto ne estas granda problemo! Pro Dio faru ion, kiel li repaciĝiu kun mi. Se li ne deziras

6. Ĝalal-ed-din Mohammad, aŭ Moŭlana aŭ Moŭlavi (30-a de septembro, 1207 – 17-a de decembro, 1273) estis islama juristo, teologo, poeto kaj sufiisma mistikulo. Li estas unu el la plej gravaj poetoj de la persa lingvo. (Vikipedio)

7. Patriarko, prapatro de izraelidoj, kies filoj estis prapatroj de la 12 izraelaj triboj.

8. Jozef (aŭ Jozefo), estis unu el la dek du filoj de la hebrea patriarko Jakob, kaj la plej amata filo de la patro. Lia patrino estis Raĥel.



Sinjoro Kohàn

repaciĝi almenaŭ malpli plori. Mia edzino ne sciis kiam temas pri vizito de la plej kara, la dieto ne nur facilas, sed ankaŭ oni eĉ iras al kaŭkaza monto<sup>9</sup>. Kara doktoro, pro la deziro vidi vin, naŭ monatojn ĉiutage mi manĝis nur unu boligitan ovoblankaĵon, unu mezgrandan kuiritan terpomon kaj iom da vaporkuirita spinaco. Laŭ kuracisto, en la plej bona okazo, revenos kvardek procentoj da mia vidado, sed kvindek procentoj revenis.

Mi gaje viŝis miajn larmojn kaj diris:

- S-ro Kohàn! Hodiaŭ estas unu el la plej bonaj tagoj de mia vivo. Mi gajas, vere gajas.

Kaj poste mi etendis mian manon al la varmbotelo por verŝi teon. Li ordone diris:

- Ne moviĝu Zàmani! Ne moviĝu, ĉar mi volas elrigardi vin.

Kaj poste li atente kaj zorege kiel perfekta fotisto, kiu volas foti memorindan artaĵon, aŭ eble kiel portreta pentristo, kiu estas deseĝnanta sian plej bonan portreton dum sia tuta vivo, diversangule rigardis mian vizaĝon. Poste li komandis: Malstreĉiĝu! kaj diris:

- Nun verŝu teon! Teo kun freŝa citrono kaj du sukerpecoj. Post la jaroj mi volas dolĉigi mian buŝon.

Mi: Ni havas ankaŭ safranon dolĉaĵon.

Li: Bonege! Kiom bone! Ni manĝas ankaŭ safranon Pulàki<sup>10</sup>.

Kiam mi metis antaŭ li la tason da teo, ankoraŭ fikse rigardis min kaj ĉi-foje diris:


- Doktoro Saheb-Zàmani, akceptu, ke vi estas plibela ol Bertrand Russell!

---

9. Mitologia monto kaj en la persa literaturo estas metaforo por indiko al la plej malproksima loko sur la tero.

10. irana bombono





La vintro de la jaro 1987  
estis malvarmega kaj se-  
vera; severa pro la milito  
okazanta ĉe la frontoj, pro  
la risko de aera bombado  
de la urboj, pro la manko  
de brulaĵo kaj medikamen-  
toj, kaj pro la porciolimigo  
de manĝaĵoj. Sed el la  
koro de tia malvarmega  
kaj severa vintro, floris la  
bonodora glacifloro noma-  
ta E-lernejo...